# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

vendredon, la 6an de Julio, 2017 • numero kvar

## Hodiaŭ

★ **7:30 atm:** Matenmanĝo

★ **8:30 – 12:15 ptm:** Lecionoj (Alexander, Kováts, Löwenstein)

★ **12:30 ptm:** Tagmanĝo

★ **2:00 – 3:30 ptm:** **EKCERCADO kun Katalin** (Pli da helpo por lernantoj en la kurso de Katalin)

★ **2:00 – 5:00 ptm:** Lecionoj (Vergara)

★ **5:45 ptm:** Vespermanĝo

★ **7:00 – 8:00 ptm:**

- **Pri KER-ekzamenoj:**

  Katalin KOVÁTS donos informojn pri la ekzamenoj. Eblos starigi demandojn, peti helpon pri elektota nivelo, ricevi specimenojn, konsilojn... kaj estos la lasta eblo aliĝi! Interesiĝantoj ne mistrafu tiun okazon!

  *En la ĉambro de la kurso de Katalin*

**– aŭ –**

- **Diskutrondo pri Duolingo**

  Margo KEVESS-COHEN, ano de la teamo kiu prilaboras la Esperanto-kurson en Duolingo, gvidos diskutrondon. Lernantoj povos demandi al ŝi, al aliaj teamanoj, kaj al lernantoj pri diversaj aspektoj de la kurso, ekzemple pri la nova "arbo."

  *Flowe 110*

★ **8:30 ptm:** Gufujo

### AVIZO

*Lasta momento! Hodiaŭ fermiĝas la aliĝebloj al la KER-ekzamenoj!*
https://edukado.net/ekzamenoj/ker

# Angulo de la verkemulo

*de Jorge Rafael ("Rafa") NOGUERAS*

*(Ĉu vi memoras la frazojn, kiujn Rafa sugestis por inspiri vin? Mi jam ricevis du rakontojn de lernantoj. Tiuj aperos en la morgaŭa* Fasko. *Ankaŭ vi povas verki ion. Jen rakonto de Rafa mem.*
*– Redaktoro)*

Adamo malamis vampirojn kaj taksas ilin fiaj estaĵoj. Ili suĉas onian sangon, foje ili mortigas onin, kaj ili neniam redonas pruntedonitajn librojn. Nu, kiel dirite: fiaj estaĵoj.

Iun malvarman, malbelan, malluman maltagon (tia, kian pli aŭdaca verkisto kuraĝus priskribi kiel frida, hida, tenebra nokto), Adamo laŭiris solecan kamparan vojon. La vento skuis la nudajn arbobranĉojn kiuj apudis la vojon, kaj ili ŝajnis flustri: "Reiru, Adamo! Vi klare rolas en hororrakonto!" Li, tamen, ne flue parolis la arbobranĉan, do li senzorge daŭrigis sian marŝadon.

Post iom da tempo, Adamo vidis kaleŝon, kiu alproksimiĝis de la foro. Kiam la veturilo atingis Adamon, la pordo lante malfermiĝis knare, kaj voĉo elinterne kveris dolĉe: "Saluton, piediranto! Vi aspektas elĉerpite. Ĉu vi ne volus, ke mi irigu vin al via domo? Mi tute ne estas vampiro. Envenu!"

Adamo, kiu ja estis laca, eniris la kaleŝon laŭ ties ŝtupetaro, kuraĝigite pri la fakto, ke la gastiganto ne estis vampiro.

"Vi aspektas soife. Ĉu vi ne volus, ke mi trinkigu vin per ĉi tiu ruĝa vino? Ĝi ja ne enhavas fortan dormigilon, por ke mi povu facile trinki vian sangon kaj poste vampirigi vin!"

Adamo, kiu ja estis soifa, bonvole akceptis la pokalon al li ofertita, kaj unuglute trinkis la tuton. Kaj tuj falis kaleŝplanken.

Kiam li vekiĝis, Adamo estis sur la strato, antaŭ sia domo. Kiel li alvenis ĉi tien, li tute ne memoris; li nur sciis, ke lia kolo tre ege doloris lin. Li stumblis en sian domon kaj rapidis en la banĉambron por ekscii kial lia kolo tiel doloris lin. Li paŝis antaŭ la spegulon; tamen, li vidis, ke la spegulo montris nenian reflekton…


Li eniris sian dormoĉambron kaj vidis slipon sur sia lito, kun la jena mesaĝo: "Vi nun estas vampiro. Parenteze, mi pruntepreniS vian ekzempleron de *La Ŝtona Urbo*. Mi redonos ĝin al vi iam."

Kiel dirite: fiaj estaĵoj.

# Momentoj el la unua kursa tago




*fotoj de Marcus GRIEP*







## Diskutrondo pri reta elsendo de filmetoj

*de Derek ROFF*

La programo por la unua vespero de KTF/NASK 2018 estis sukcesa diskutrondo pri reta elsendo de filmetoj. Ĉirkaŭ 40 personoj ĉeestis la 90-minutan prezentadon de Tomaso ALEXANDER, Charlotte BURTON, kaj Alekso MILLER. Ili regalis nin per multaj interesaj detaloj, spertoj, utilaj sugestoj, kaj opinioj pri la kreado de filmetoj en Esperanto. Demandoj de la spektantoj, de Derek ROFF, kaj de Alena ADLER iluminis plurajn interestajn flankojn de la temo.

Eble surpriza afero estis ke la redaktado/muntado de la filmeto povas daŭri tre longe. Oni demandis pri la redaktaj/muntaj programoj, kiujn la spertuloj uzas. Ni promesis aperigi ligon kun listo de senpagaj ebloj, programoj kiuj estas plejparte senpagaj, kaj kiuj ekzistas en versioj por Linukso, Vindozo, kaj Makintoŝo. Ek al la kreado de via unua filmeto!

https://www.tecmint.com/best-free-video-editing-softwares-for-linux/

# Kelkaj anoncoj

Ĉiuj, kiuj volas prezenti en la distra vespero sendu retmesaĝon al Alena (<adreso forviŝita>). Iuj jam parolis al ŝi vizaĝ-al-vizaĝe, sed ŝi bezonas retmesaĝajn adresojn, por ke ŝi povu disdoni informojn pri la provluda hortablo, kaj tiel plu.

★

Se vi havas ian scipovon pri la lingvoj/skriboj kiuj uzas ĉinan skribon, ĉefe la tiel nomita klasika/literatura ĉina lingvo (Wenyanwen/Kanbun), sed ankaŭ pri la mandarena, la japana, eĉ korea hanja aŭ vjetnama chu nom, bonvolu kontaki/alparoli Zerbie, kiu volas ekprilabori projekton rilatan al tiu temo.

★

Ellen metis formularojn pri uzo de la gimnastikejo sur la tablon en *Finley Hall*. Oni devas subskribi formularon kaj kunporti ĝin kune kun sia enirkarto al la gardista oficejo en *Main Building*. La gardistoj aldonos al la karto la povon malŝlosi la pordon de la gimnastikejo. La gimnastikejo estas konstruaĵo 14 sur la mapo de la unua numero de la *NASKa Fasko*.

Ellen placed some forms about the use of the gym on the table in Finley Hall. Sign a form and bring it with your entrance card to the security office in the Main Building. The guards will add the ability to unlock the gym door to your card. The gym is building 14 on the map in the first edition of the *NASKa Fasko.*

★

La manĝejistoj petas, ke ĉiuj NASKanoj eliru la manĝejon je la 6:30 ptm post vespermanĝo.

The cafeteria staff requests that all NASK participants leave the cafeteria at 6:30 after dinner.

# Libroj haveblaj de Liĉjo

| Libro | Prezo | Notoj | Haveblaj ekzempleroj |
|---|---|---|---|
| *Esperanta Antologio* | $8 | Grava antologio de originala poezio en Esperanto. Tute novaj. | 2 |
| *Teach Yourself Esperanto* | $8 | Bona lernolibro por parolantoj de la angla. Uzitaj libroj, sed en bona stato. 3a eldono. | 3 |

Kontaktu min, se vi havas intereson aĉeti.
-Liĉjo

## Vortlisto por la hieraŭa enigmo

ALBUMO, AMIKO, ARKEO, BARBIRO, BEZONI, CIKONIO, CIMO, CINAMO, DELFENO, DORNO, EMERITO, ER, KLINETO, KORKO, KORO, LOBO, NOTO, OL, ORO, ORTO, PENO, PINO, RIPO, TURPA, ZENO